

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)


エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Pendlanternoj por aprezi sakurojn — kun nia nomo

En Japanio estas plezuro aprezi plenflorantajn sakurojn (ĉerizflorojn), ankaŭ vespere reflekte de lanternoj, pendentaj super nia kapo. Nu, ĉi-jare, laŭ la digo de Rivero Oooka en Jokohamo, ĉ. 2500 lanternoj pendis, kaj 6 el ili montris nomon de nia grupo, nome “NPO Esperanto Jokohama” unuflanke kaj “Esperanto-Muzeo Jokohama” aliflanke (en la japana). La loko estis piede 30 minutojn de nia Muzeo. La lumigado de la lanternoj okazis de la 24a de marto ĝis la 9a de aprilo, de 18:00 ĝis 21:00, dume la lanternoj estas kompreneble videblaj ankaŭ tage.

La pendigo de unu lanterno kostas 5 mil enojn, kaj 2 lanternoj estas de nia buĝeto, dum 4 aliaj de la ofermomo de la volontaj membroj. Ni esperas, ke tio eĉ iom servis al la informado de nia Esperanto-agado.

(Oni povas vidi la scenon, ankaŭ en nia retejo: <https://www.esperanto.yokohama/>)



EL NIA MUZEO

Libroj donacitaj de niaj antaŭuloj

La Muzeo akceptas Esperantajn librojn de longtempaj esperantistoj, aŭ de iliaj heredantoj, ofte alsenditaj al ni per skatoloj el ondumitaj paperoj. Jenaj estas de la lasta jarfino.

*De s-ino Sasaki Rituko el Gubernio Iwate: 30 ekzempleroj de la libro pri la bedaŭrata s-ro Satoo Syooiti, nomata “Hobune no roman”. S-ro Satoo entuziasme movadis en Iwate.

*De s-ro Kaba Toyohiko el Gubernio Kioto: inkluzivitaj estas numeroj de “Korea Esperantisto” eldonita en 1937 sub la japana regado de la korea duoninsulo.

*De s-ino Endoo Hisako (filino de la bedaŭrata s-ino Yazaki Yoko el Gubernio Hokusima): Libroj lasitaj de la patrino.

*De s-ro Takehana tetuo (filo de la bedaŭrata s-ro Takehana Tosikazu el Gubernio Oosaka): Libroj lasitaj de la patro.

La 127-a Legokunsido

En la 3a de marto 2023 ni havis la 127-an legokunsidon por "Vojaĝo al Kazohinio, dua parto" verkita de Sándor Szathmári. Partoprenis 4 personoj.

Stranga kaj groteska vojaĝrakonto - "Vojaĝo al Kazohinio" de Sándor Szathmári

Mizro Iwaya

La ĉefheroo de tiu ĉi rakonto estas Gulivero. Do mi tuj rememoras faman romanon de Jonathan Swift. Jes, la fundamenta strukturo estas sama, sed la enhavo iom malsamas. Mi komprenas ke tiu de Swift ironie kritikis tiaman socion de Britio. Do kion kritikis tiu de Szathmári? Supozeble nenion krom imagita socio, sed se mi devas montri ian modelon, mi diras ke la kritikitaj estas tiama Sovetunio kaj Germanio. Tiusence tiu ĉi verko estas precedenco de "1984" verkita de George Orwell kelkajn jarojn poste. Ĝi priskribas danĝeran estontan mondon, sed fakte ĝi montras estantan emon de despotismo. Ankaŭ Szathmári ŝajne havis tian timon. Tiu temo daŭras en "1Q84" de Murakami Haruki.

La unua parto traktas la vojaĝon de Gulivero en Kazohinio. Gulivero de Jonathan Swift iris unue al Liliputo antaŭ 300 jaroj, kie la homoj estis treege malgrandaj. Nu, Gulivero de Sándor Szathmári iris unue al Kazohinio, kazo (racia) ŝtato de hinoj, en 1930aj jaroj, kie homoj estis mezgrandaj sed la socio estis superlogike ordigita. Ĝi funkcias bone sen leĝoj, sen mono. Homoj ne plu havas emocian motivon en la vivo, ĉar ĉio necesa estas jam preta tie. Ilia socio aspektas ideala futura socio realigebla nur post cent jaroj de nun. Ŝoseoj estas bone pavimitaj per mola materialo, kiu ebligas glatan veturon de aŭtoj. Domoj estas ŝutitaj tie kaj ĉi tie kun bona ekipaĵo, k.t.p k.t.p. Ĝi estas la stato de prakomunismo. "Ne ekzistas ŝtato, nek regantaj organoj, oficoj, parlamento, tribunaloj, polico; neniun ordonas, neniun dividas la taskojn, ĉio plenumiĝas de si mem kaj per si mem, plejeble racie, plejeble ekonomie, sen krizoj kaj karamboloj. (laŭ Tomaš Pumpr)" Tio estas miraklo! Do oni povis vivi tie tute feliĉe, ĉu?

Gulivero ne povis kredi tion. Homoj ĉi tie

estas nur robotoj. Ili vivas solaj kaj silentaj. Ili ne havas senton, nek emocion, nek muzikon, nek ridon. Tro da logikeco devigas ke oni ne povas kondolenci. La mortinto ne plu estas homo. Ĝi estas nur objekto kaj traktata kiel materialo. Oni ne konsideras pudorecon antaŭ aliseksula ekzisto. La kulmino de tiu senhomeco estas en la amo kaj seksumo. Gulivero renkontis junulinon Zolema, kiu tre plaĉis al li. Li amindumis ŝin kaj sukcesis havi amrilaton kun ŝi. Kiam li intencis poste ĝui "aman atmosferon" kun ŝi, ŝi rifuzis tion dirante, "Seksumo estas nur cele al infannasko." Ja tia estis la socio de hinoj. Li nomis ŝin "floro senodoro." Li ne plu povis toleri tian socion. Li aŭdis ke ekzistas najbare fermita provinco de behinoj, kiuj havas malan tendencon. Do li petis la gvidanton permesi lin iri tien.

La dua parto temas pri provinco de behinoj. Malkontenta Gulivero iris al tiu provinco kaj trovis pli strangan socian kutimon. "Pric-prucc" estas salutvorto. Aperis multaj "neologismoj" nekompreneblaj krom ĝi. Ekzistas diversaj devoj: porti sanktan kvadraton antaŭ betiko (eminentulo)n, devis disdoni flavajn ŝtonerojn por nutraĵo. Tiamaniere viciĝas nekompreneblaĵoj unu post alia kun strangaj ĵargonoj. Klara estas tio ke ekzistas tie firmaj sociaj klasoj. Subuloj devas obei superulojn. Precipe virinoj havas strangan manieron en manĝado kaj ili ne povas havi sufiĉe da nutraĵoj. Anebaoj (legenda devo) estas pli grava ol aktualaj faktoj, k.t.p. La priskriboj estas tro detalaj kaj mi ne povas sufiĉe sekvi ilin. Fine ili komencis bukuon (interbatadon) kaj Gulivero estis kondamnita, li ne scias kial, kaj ekzekutota sur monteto. Ĝuste tiam intervenis hinoj kaj savis lin.

Tiamaniere li revenis al la socio de hinoj (Kazohinio). Tie li aŭdis solvon pri la supra strangaĵo. La agoj de behinoj estas atavismo, kiun hinoj mem posedis kaj supervenkis por la nuna sublimesa ordo. Sed daŭris lia deziro eskapi el tia stranga socio de hinoj. Li mem fabrikis motorboaton kaj forŝteliĝis al la maro.

Feliĉe li estis savita de angla batalŝipo. Kiam li rakontis sian ĝisnunan historion, anglaj soldatoj eksplodis en ridego. Tial ankaŭ li konfirmis ke lia sperto estis eksterordinara.

La libroj de Swift, Orwell kaj Murakami vendiĝis bone, sed tiu de Szathmári ne bone. Kio estas la diferenco? Ĉu la larĝeco de lingvaj merkatoj? Aŭ tro diletanta enhavo?

Du malutopioj, sed kun bonvoluloj – “Vojaĝo al Kazohinio” de Sándor Szathmári –

Sibayama Zyun'iti

Tiu ĉi novelo, kiu paŭsis la strukturon de la brita originala Gulivero, rakontas pri la sorto de brita mararmea doktoro Gulivero, kiu aldrivis nekonatan insulon, kie vivas homrasoj nomataj “hinoj” kaj “behinoj” tute kontrastaj, tamen fine povis bone rehejmiĝi.


Ni legantoj aŭ ĝojas aŭ malĝojas kun la ĉefrolulo Gulivero, kaj povas sekvi la rakontan fadenon, ĉar ĉiuj hinoj kaj preskaŭ ĉiuj behinoj estas bonvolaj al Gulivero, eĉ se iliaj karakteroj estas tute kontrastaj (bildo 1). Hinoj estas tro logikaj kaj behinoj tro mallogikaj. Hinoj iel protektas behinojn per manĝaĵoj ktp. El tio oni konkludas, ke la lando de hinoj estas utopia, sed tiu de behinoj estas malutopia.

Gulivero en la mezo de la rakonto tamen mem deziras eliri de la lando de hinoj kaj iras en la landon de behinoj. Preskaŭ fine de rakonto, li revenas al la lando de hinoj sed memvole celas Brition. Do al li, la landoj de hinoj ne estis utopia.


Kio sentigas al ni tion, ke eĉ la lando de hinoj estas malutopia? Mi vidas la kialon, ke la rakonto ne estas kor-varmiga, sed kor-fridiga al la legantoj. Tiu fridigeo aperas en la personeco kaj de hinoj kaj de behinoj (bildo 2).

El tiu vidpunkto, mi sentas, ke la traktado de hinoj al behinoj estas ja biologia eksperimento. “Behinujo” estas granda kaĝo por eksperimenti pri la (mal)logikeco de la estaĵoj kiu ne evoluas, malgraŭ atendo de la eksperimentantaj hinoj. En la rakonto, Gulivero rimarkas pri la manko de plezuro kaj ludemo inter hinoj, sed mi sentas ke la eksperimento estas iel “plezuro varti malfortajn vivaĵojn”, kaj tio sentigas al

mi, leganto, ian kor-fridecon.



bildo 1



bildo 2

Forpasis nia ŝanhaja amiko, s-ro Ji Yingeng (86-jara)

Ni estis informitaj, ke s-ro Ji Yingeng, nia membro-abonanto en Ŝanhajo, Ĉinio, estis jam forpasinta. Antaŭ kelkaj jaroj, de li esperantigitaj fabeloj aperis en tiu ĉi gazeto. Pacon al lia cindro!



Letero el Tatjana Auderskaja el Ukrainio

(el letero al s-ro Suzuki Keiichiro)

Kara Keiĉiro,

mi dume sukcesis atingi tion, al kio mi strebis dum 15 jaroj. En profesia teatro oni surscenigis verkon kreitan en Esperanto kaj tradukitan al la rusa lingvo. Temas pri teatraĵo “Rigardu antaŭ ol salti” de angla verkisto Harold Brown. Mi jam antaŭlonge tradukis ĝin, sed ne tuj trovis teatron, kiu konsentus surscenigi. La vidvino de l’ aŭtoro donacis al mi la libron “Eduko danĝera”, el kiu mi elektis tiun teatraĵon, ĉar ĝi estis humura-absurda, kio plaĉis al mi. Kaj jen, fin-fine, premiero! Ĝi okazis la 15an de februaro, kaj al mi ŝajnas, ke tio estis unua okazo en la historio de Esperanta kulturo, ke oni surscenigas en nacia lingvo la verkon originale kreitan en Esperanto! Mi vere ĝojas pro la evento!

Jen mi sendas la afiŝon de jam tria prezento kaj kelkajn fotojn. Eble, por vi kaj miaj amikoj el Hama-rondo estos interese :-)

La fotoj “picturepicture” apartenas al retejo Dumskaja.net, la aŭtoro Oleg Vladimirskij.

Mi salutas vin ĉiujn,

via Tanjo

